

Volume 3

March 1908

Number 2

A M E R I K A E S P E R A N T I S T O

A Monthly Magazine of the
International Auxiliary Language

Esperanto

TEN CENTS A COPY

DOLLAR A YEAR

AMERICAN ESPERANTIST COMPANY

186 FORTIETH STREET

CHICAGO

Amerika

Esperantisto

Monata Revuo de la Lingvo
Internacia

A Monthly Magazine of the
International Language

Redaktoro kaj Administranto ARTHUR BAKER Editor and Manager

ABONOJ

Una numero, Sd. 20; jarabono, Sm. 2.05. Ni ne disdonacas provajn ekzemplerojn, sed postulas, ke ĉiu, kiu mendas ekzempleron, por kia aĵa celo, pagu por tiu sama. Eksterlandanoj povas sendi aŭ internaciajn kuponojn aŭ naciajn poŝtmarkojn por provaj abonoj.

TARIFO DE REKLAMADO

Proportie al disvendado, niaj prezoj estas la plej malkaraj el ĉiuj revuoj esperantaj. Largo de kolonoj, 63 mmj; longo, 204 mmj.

Plena paĝo, Sm. 20.50; duonpaĝo, Sm. 10.25; kvaronpaĝo, Sm. 5.15; malpli ol kvarono, po 7 spesdekoj ĉiun metrokilonon.

MANUSKRIPTOJ

pri la aĵn temo, estas danke ricevataj kaj zorge legataj. Tiujn, kiujn ni ne povas uzi, ni ĉiam resendos, se oni kunmetis poŝtmarkojn.

SUBSCRIPTIONS

Single number, ten cents; annual subscription, \$1.00. We do not distribute free sample copies, but require that every person who orders a copy, for whatever purpose, shall pay for it. For sample copies, foreigners may send international coupons or national postage stamps.

ADVERTISING RATES

In proportion to circulation, our rates are the lowest of all Esperanto magazines. Width of column, 2 1/2 inches; length, 8 inches.

Full page, \$10.00; half page, \$5.00; quarter \$2.50; less than quarter, basis 6 cents per agat line—14 lines to the inch.

MANUSCRIPTS

on any subject are gratefully received and carefully read. Those which we cannot use we shall always return, when accompanied by postage.

AMERIKA ESPERANTISTA KOMPANIO

CHICAGO

THERE'S COMING a new edition of the American Esperanto Book.

It will be printed on bible paper, very thin, strong and light. It will be sewed, with a paper cover. The entire book of 320 pages will weigh exactly four ounces, and will be the tra-la-la of convenience for the fellow or kamaradino who wants a constant companion for consultation on the cars, at table, etc. Can be readily put into a lady's purse or a man's pocket, and will not be in evidence until wanted. Price?? It positively will not be sold at any price, nor will it be given away to any one except one who renits for a full year's subscription to this magazine, asking for the book at the time of sending the remittance. To such it will be sent post free. Any club, or any individual ordering five subscriptions at once, will get our regular club discount of 20 per cent. Clubs which are our regular customers may send in any number of orders at this price.

About Book Discounts

On our regular combination offer of Book in cloth and magazine one year at \$1.50, the discount on club orders of five or more is 20 per cent. On orders

for the book alone, price \$1.00, the same discount in fives or more.

OUR APRIL NUMBER

Will be by far the biggest and best yet. It will have the grammar and vocabulary reprinted from February, with plenty of other stuff. Including the ads about 48 pages. The Western News Company refuses to handle our February, because, they say, there's not enough demand. Let's see. YOU order five or more copies of APRIL at FIVE CENTS. We will send you a display card telling about it. You hand the bundle to your dealer and see that he puts up the card. Charge him SEVEN CENTS for each copy he sells. Write right in, right now, on a post card, or letter with the money at 5c, and say how many APRILS you'll take. The wholesale news company wants to be shown. Will we show them?

VENTEGO EN TEUJO

De la tempo kiam unue aperis Esperanto, estas leviĝintaj kelkaj miloj da homoj, kiuj povus plibonigi ĝin. Pri tio, ni havas ilian propran ateston. Kaj, ĉar nenie ekzistas perfektaĵo, Esperanto bezonas pliboniĝi. Sed kiamaniere? La plej grava kaj plej bona afero pri Esperanto, ekster ĝia simpleco, estas ĝia popular-eco. Nenia ŝanĝo devas fariĝi, kiu dividus en du kampojn la esperantistaron. Plie, tia ŝanĝo ne povas okazi, ĉar kontraŭ tio nin gardas la Deklaracio farita en Boulogne-sur-Mer. Se ia homo, kiel ajn honorita, forkurus portante la fundamentajn ideojn kaj materialon de Esperanto, fabrikante al si novan lingvon, ĉu pli bonan aŭ malpli bonan, ol Esperanto, tiu povus nomi sian produktaĵon kiel ajn li volus, sed la mondo lin markus ŝtelinto.

Sed precize pro tiu fakto, ke sur la Fundamento staras tro multaj, por ke ni bezonu ektimi, ni traktu ĝentile kaj milde kun la plibonigistoj kies postulojn la Deklaracio ne malpermesas. Se ia homo volas porti al ni novan sufikson, ni almenaŭ ne brufermu la pordon kaj pinĉu lian nazon. Afable, ĝentile! Kredeble por trakti kun li oni kreis la Lingvan Komitaton. Kaj tiaj aferoj apartenas al la Komitato.

Antaŭ kelka tempo, el la tuta reformistaro, du, kaj nur du, interkonsentis. Sed ili interkonsentis nur jene: ke Ido ŝatis kaj estimis siajn reformojn, dum Antido ŝatis kaj estimis siajn reformojn; kaj ke ili, kun tutkora reciprokeco kaj ĝojiga entuziasmo, mal-admiris kaj malaprobis ĉiu la reformojn de la alia. Tian unuecon ni devas nek timi, nek atenti, ĉar la tempo tro pleniĝas je nia tasko de propagando. La tuta afero estas unu furioza blovego en eta, delikate pentrita teujo.

SALUTU LA VOJAĜANTOJN ESPERANTE!

La Esperantista Grupo Pariza sendas al *Amerika Esperantisto* la jenan leteron, petante, ke oni ĝin dissendu kiel eble plej vaste. Ni do deziras, ke tiuj el niaj samideanoj kiuj povas atingi la urbojn trapasotajn de la aŭtomobilistoj, tion faru kaj salutu la esperantistojn. Vi povas fidi al tio, ke granda ĵurnala bruo anoncos ilian alproksimiĝon. Jam antaŭ ol vi legos tion ĉi, ili estos trapasintaj Ĉikagon:

Vi scias ke baldaŭ la konkursantoj-aŭtomobilistoj por la vojaĝo "New York ĝis Paris tra la Behring'a Markolo," organizita de la franca ĵurnalo *Le Matin* kal de l' *New York Times*, devas forlasi New York'on por trairi Amerikon kaj espereble Nordan Azion.

Okaze de tiu sentima entrepreno la Grupo Pariza opiniis ke estus utila por nia afero ke Esperantistoj sin montru en tiu okazo, kaj kiel eble plej serveme akceptu kaj helpu la konkursantojn el kiuj kelkaj iom lernis Esperanton. Kred-eble tiuj ĉi, kaj sekve *Le Matin* estos devigataj ilin danki kaj siavice konigi la utilecon de nia lingvo kaj la plinomb-rigon de ĝiaj adeptoj.

Por tio, varma alvoko al Esperantistoj loĝantaj en la urboj trairotaj de la konkursantoj estas publikigita de ĉefaj francaj esperantistaj ĵurnaloj, inter kiuj; *La Revuo*, *Lingvo Internacia*, l' *Esperantiste* k.c.

Bedaŭrinde tiuj gazetoj nur enhavas "traamerikan vojplanon" unue proponitan kaj komunikitan al ni de *Le Matin* (New York, Chicago, Seattle, Skagway, Dawson, Tanana, Nome City, Fort Clarence). Ili tro frue presiĝis por publikigi la definitive deciditan vojplanon, kiu estos tre malsimila.

Jen tiu lasta kaj ĝusta nomaro:

Forveturo de New York 13'an de Februaro: Albany, Buffalo, Cleveland, Toledo, Chicago 18'an de Februaro, Clinton, Cedar Rapids, Marshalltown, Omaha, Columbus, Buda, North Platte,

Ogallala, Big Springs, Sidney, Pine Bluffs, Cheyenne, Rock River, Rawlins, Rock Springs, Castle Rock, Ogden, Tecoma, Cobre, Palisade, Humbolt, Reno, San Francisco.

De San Francisco al Seattle, "marveturado." De Seattle al Valdez, "marveturado." Valdez, Fairbanks, Tanana, Nulato, Unalakleck, Nome City, Fort Clarence.

Ni do petegas de vi, ke viavice vi bonvolu kiel eble plej rapide sciigi cirkulere aŭ aliremede tiun nomaron al tiuj el viaj abonintoj aŭ korespondantoj, kiuj loĝas en aŭ apud la diritaj urboj aŭ lokoj.

Helpante la aŭtomobilistojn, ili samtempe faros servojn al kuraĝegaj homoj kaj al nia kara Esperantismo!

Ni speciale rekomendas al ili la franc-flagportantan veturilon "De Dion Bouton" per kiu vojaĝos la "ĵusesperantistiĝinto" Sro. Bourcier Saint Chaffray la iniciatinto de l' vojaĝo. Estas li, kiu raportos pri ĝi en *Le Matin*; estas do li precipe tiu kun oni devas efike agi por nia afero.

Fine kaj plie, ni treege konsilas al vi tiuj interrilatiĝi kun la New York'a organizanto. Sro. Reick, el la *New York Times*, kaj sciigi al li nian kaj vian agadon kaj niajn proponojn de "peresperantistaj" helpoj.

Dezirante al vi bonan sukceson en tiu eksterordinara kaj kaptinda okazo, mi petis vin ricevi, estimata samideano, la sinceran esprimon de niaj koraj sentoj.

LA UNUA AMERIKA ESPERANTISTO

KUN NOTOJ PRI LA FRUA HISTORIO KAJ LITERATURO DE
ESPERANTO

VERKIS WILLIAM GEORGE ADAMS

Estas ja vere ke la propagando de la lingvo internacia Esperanto dum la unuaj dek sep jaroj de ĝia historio, progresadis multe pli malrapide en nia propra lando ol en la Eŭropaj landoj kaj eĉ en Perulando kaj Meksikujo. Sed ni ne povas atribui tiun ĉi malrapidemon al manko de fervoraj propagandistoj sed plivere al la fakto ke, malsame de la diversaj Eŭropaj landoj, la ĝenego pro diverseco de lingvoj ne prezentas sin tiel trude al ni kiel ĉe ili.

La nuna hialanda movado por Esperanto estas rezultato de la granda sukceso kiun ricevis la lingvo en la jaroj 1902-5 en Granda Britujo. Nia movado estas filio de la brita movado: ekzemple dum ĝia unua jaro la Bostona grupo, la unua en Usono, estis ano de la Brita Asocio. (Mi nomas tiun grupon la unua en Usono ĉar estas alia proksima grupo pli malnova, la Montreala grupo, kiu estas kredible la unua en la du Amerikoj; ĝi dum kelkaj jaroj eldonis bonan journalon *La Lumo*). Sed tamen la unuaj propagandistoj kaj verkistoj de Esperanto ĉe la angloparolantaj popoloj estis Amerikanoj (mi nomas Sron. Riĉardon Geoghegan, amerikano ĉar li nun de longe estis amerikana civito kaj faris preskaŭ la tuton de sia laboro por Esperanto en nia lando.)

En Julio 1887 Dro. Zamenhof publikigis sub la pseŭdanomo Dro. Esperanto la unuan verkon pri Esperanto, "Lingvo Internacia. Antaŭparolo kaj Plena Lernolibro," en la rusa lingvo. En la sama jaro li eldonis tradukojn de la libro per

la lingvoj pola, franca kaj germana. Tiu ĉi unua Esperanta lernolibro konsistis el la "Unua Libro de Esperanto" kaj la "Plena Gramatiko," kiuj sin trovas en la Krestomatio.

Amiko de Sinjoro Riĉardo Geoghegan (tiam studento ĉe Oxford) legis en gazeto pri la nova lingvo kaj skribis Zamenhof latinene. Dro. Zamenhof respondis sendante lernolibron en la germana. Ekzameno de la Zamenhofa lingvo faris el Sro. Geoghegan fervoran Esperantiston kaj dum la tutaj postaj jaroj de la lingvo ni trovas lin ĉiam laboranta por la sukceso de Esperanto. En la jaro post kiam li aliĝis al la lingvo (1888) li verkis tradukon de la Zamenhofa lernolibro, No. 5 en la Esperanta Kolekto, la unua priesperanta libro en la angla lingvo. Dum la sekvantaj jaroj oni ankaŭ tradukis tiun libron en la lingvojn hebrean (Hunez), svedan (Henric Lunquist), latvan ("Lettish," de Libeks), rumanan (Marietta Frollo), danan (Nielson), bulgaran (Bogdanov), italan (Marignani), portugalan (Ferriera), hungaran (Barabas), k.t.p.

Tiuj ĉi unuaj lernolibroj ne enhavis vortarojn kaj tiujn oni nun presis aparte, en multaj diversaj lingvoj. En la sama jaro aperis la unua (krom kelkaj mallongaj tradukaĵoj de Zamenhof, la Dua Libro kaj la Aldono) literatura verko en Esperanto, "La Neĝo Blovado" de Pushkin, tradukita de polo, A. Grabowski, kiu de tiam verkis multajn literaturaĵojn en nia lingvo, kaj prozaj kaj poeziaj; li ankoraŭ nun laboras por nia afero. Tiu

ĉi verko estas aparte rimarkinda pro tio, ke ĝi uzas nur 900 radikvortojn, sed tamen havas stilon klaran, belan kaj ja imitindan.

Tiuj ĉi lernolibroj estas neplenaj ĉar la vortaroj estis presitaj aparte, sed nun Leopold Einstein, germano kiu antaŭe estis Volapukisto kaj estis verkinta grammatikon de tiu lingvo, sed kiu je la apero de Esperanto forlasis la mortontan sed tiam tre florantan Volapukon kaj iĝis fervora subtenanto de la Zamenhofa lingvo, nun eldonis pli plenan lernolibron, kun vortaroj. Tiujn poste kelkajn jarojn, Geoghegan, kiu tiam estis transloĝiginta sin al Ameriko kaj loĝis en Tacoma, Stato Washington, tradukis anglan (No. 52) kaj ĝi estis presita ĉe Nuremburg, tiam la centro de la Esperanta movado. Poste kiam la klubo Esperantista en Upsala, Svedujo, estis la propaganda centro de la movado, oni en tiu ĉi urbo presis duan eldonon (1898).

L. de Beaufront, la famkonata franca Esperantisto, aliĝinta al Esperanto, verkis en sia propra lingvo tre utilan propagandan verketon kiun Zamenhof tradukis rusen kaj W. Trompeter en la germanan. (Trompeter estis germana Esperantisto kiu subtenis la lingvon per sia influo kaj kaso dum multaj jaroj. En la jaro 1893 aŭ-4 li venis Amerikon kaj vizitis la usonajn samideanojn, en tiuj jaroj tre malmultaj. Malfeliĉe li mortis antaŭ ol la burĝono kies kreskadon li flegis iĝis bela, ĝojiga florego). Tiun ĉi broŝuron ankaŭ Sro. Geoghegan tradukis por helpi la propagandon ĉe la anglaparolantoj, sub la titolo "A Few Words on the International Language Esperanto." Ĝi aperis en multaj aliaj lingvoj.

Sed, haltu, mi tro rapidas; mi volas iom priparoli la unuan amerikan Esperantiston, Henry Phillips, kiu komencis laboron por la afero antaŭ aperis tiuj laste pritraktitaj verkoj kaj ne longe

post kiam aperis la unua verko de Geoghegan.

Je la tempo de la naskiĝo de Esperanto la *American Philosophical Society* tre interesiĝis pri la projekto de lingvo internacia kaj eldonis priskribon pri la kvalitoj kiujn tia lingvo devas posedi. En tiu periodo (1888) Volapuk treege floriĝis. Cent miloj da homoj studis ĝin kaj ĉiuj kredis ke la problemo pri lingvo internacia estis jam tiam solvita. Eĉ en nia lando Volapuk estis triumfa. Unu lernolibro (tiu de Lingenfelter) havis kvar eldonojn en kvar monatoj; la unua eluziĝis dek tagojn post sia apero. Komitato de la *American Philosophical Society* ekzamenis la lingvon Volapuk kaj, kvankam ĝi konsideris Volapukon la plej bona tiam aperinta projekto, tamen ĝi severe kritikis ĝin. Poste, ekzameninte Esperanton, ĝi donis al ĝi plenan aprobon kaj tiel raportis al la societo. (Vidu Vol. xxv, p. 3., *Proceedings of the American Philosophical Society.*)

Henry Phillips, la sekretario de la asocio, kiu tre interesiĝis pri la afero de lingvo internacia, en tiu jaro, laŭ peto de Zamenhof, verkis la unuan libron pri Esperanto kiu aperis en Ameriko kaj ni do povas nomi lin la unua amerika Esperantisto. (La aŭtoro de unu lernolibro eldonita 1905'an konstatas ke tiu estas la unua nialande eldonita, sed kiel vi vidas la konstato estas ja ridinda).

Tiu libro konsistis el antaŭparolo de Phillips kaj traduko de la Antaŭparolo kaj Plena Grammatiko enhavitaj en la unua lernolibro de Zamenhof. Ĝi ankaŭ enhavis specimenojn de la lingvo, poeziajn kaj prozajn el la Dua Libro kaj ankaŭ du vortarojn, la esperanta-anglan vortaron de Zamenhof, kun angla-esperanta vortaro verkita de Phillips. Krom tio ĝi enhavis liston de la ĝistiamaj literaturo de Esperanto kaj kelkajn ekzemplerojn de la jena aliĝilo, havantajn

spacojn por surskribo de la nomo: sia sindonema laboro kaj nun lia nomo estas apenaŭ konata de ia Esperantisto.

PROMESO

Mi, subskribinta, promesis ellerni la proponitan de dro. Esperanto lingvon internacian, se estos montrita, ke dek milionoj personoj donis publike tian saman promeson.

Tio ja estis grandan projekton, kolekti dek milionojn da subskriboj al tia promeso. Komprenoble la afero neniam fariĝis, certe ni ne trovas pritrakton de ĝi en la historiaj priskriboj de la lingvo.

Tiu ĉi lernolibro estis presata uzante la literon *h* anstataŭ la supersigno, ĉar tiam oni ne povis havigi tiajn preslitterojn ekster kelkaj eŭropaj urboj. Ĝi enhavis multajn preserarojn kaj tiuj ne estis forigitaj en la presprovaĵoj, ĉar dum la preparado de la libro la aŭtoro malsaniĝis kaj post ne longe mortis.

Kiam Henry Phillips, la pioniro de la lingvo en Ameriko, mortis, la movado por Esperanto en la lando ricevis fortan baton. Se li estus vivanta li sendube per sia influo kaj energia propagandado estus helpinta la lingvon internacian multe kaj nia lando estus farinta centro de tiu granda movado. Sed li mortis antaŭ ol li povis vidi ian rezultaton el

La Esperantistoj nunaj vidas kaj ĝuas la rezulton de la pionira laboro, sed ili malofte pensas pri la jaroj en kiuj Esperanto malgraŭ malkuraĝigoj kaj malprosperoj militis sian vojon antaŭen, kaj ili ne sufiĉe honoras kaj apenaŭ konas la sindonemajn animojn pro kies laboroj kaj penegoj Esperanto nun staras antaŭ la mondo lingvo sukcesa, vivanta kaj floranta, kun "la juneco en ĝia koro kaj la mateno en ĝiaj okuloj."

Vi kiu legas tiun ĉi artikolon, ne pensu ke la Esperanta movado en nia lando komencis en la urbo Bostono en la jaro 1905, enportita el Anglujo: vi memoru ke eĉ en la unua jaro de la lingvo, ĝi trovis fervorajn helpantojn en Usono kaj dum la jaroj kiam Esperanto estis nekonata kaj baraktanta por vivo, tiam en nia lando kiel en aliaj, homoj laboris kaj propagandadis por la inspira celo kiu instigas nin. Memoru la nomojn de Henry Phillips, la unua amerika Esperantisto, kaj Riĉardo Geoghegan, la sindonema pioniro kiu dum multaj jaroj preskaŭ sole subtenis la lingvon internacian ĉe la angloparolantaj popoloj.

LA LIBRO DE LA NATURO

Esperantigita de Eugene F. McPike el
la franca teksto de *La Chaumière
Indienne*. de Saint-Pierre

Ho, homo, kiu pensas ke sin ne trovas en la universo alia libro ol tiu per kiu oni vin instruis legi, kaj alia lumo ol tiu de via lampo, rigardu la libron de la naturo kaj la stelon de la tago kiu ĝin iluminas por la instruado de la tuta homaro! Legu en la naturo kaj vi vidos ke ĉiuj la veroj venis de Dio, tiamaniere kiel

ĉiuj la lumoj venis de la suno. Kio do estas necesa por ilin kolekti kaj ilin tenadi? Koro pura kiu sin malfermas je la vero kaj kiu sin fermas je la antaŭjuĝoj. La naturo ĝin al vi donis ĉe naskiĝo tiamaniere kiel ĝi donis al vi okulojn por vidi la lumon, kaj palpebrojn por ilin koverti.

FAKO DE L' SCIENCO

Redaktas E. F. McPike. Por tiu ĉi fako oni petas simplajn popolajn artikolojn

RAPORTANTE el Hanover, en Germanujo, Sinjoro Robert J. Thompson, la konsulo de Usono, priskribas pri nove elpensita aparato por malvarmigado kaj por glaciigado, kiu, laŭ lia opinio, donas bonan promeson ke ĝi tre helpos la komforton kaj la sanon de la homo, en la estonteco. Oni, antaŭ nelonge, elmontris modelon de la aparato en la urbo Hanover. Sinjoro Thompson ĝin priskribas jene:

“Ĝi estas afero tre simpla kaj nekosta. Oni povas ĝin fabriki aŭ konstrui por elspezo kiu, eble, ne superus la sumon de unu dolaro amerika aŭ ĉirkaŭ du spemiloj. Ĝi konsistas el duobla mura kesto elfarita el stano kaj enhavonta dek kvin litrojn aŭ plu. Spaco malplena sin trovas inter la du muroj, aŭ inter la ekstera kesto kaj la interna kesto. Tiu ĉi spaco havas proksimume dudek kvin milimetrojn da larĝo, kaj ĝi tute ĉirkaŭas la internan keston. La enhavo de la interna kesto estas subite kaj absolute glaciigata pro la grada enirado de acido karbona en la parton ĉirkaŭantan, je la malsupro de la kesto. De tiu parto la acido poste fluas en la keston propran aŭ internan, je la supro de tiu ĉi, tra horizontala tubeto, kiam la tuta enhavo fariĝas subite kaj absolute glaciigata, kiel ni jam supre diris. Akvo sangiĝas en glacieron post sesdek sekundoj. Vianĉoj, fruktoj, trinkaĵoj en boteloj, ekzemple biero, ĉampano, vino, k.t.p., oni povas malvarmigi aŭ eĉ glaciigi post malmultaj sekundoj. Tiu ĉi rezultato

estas produktata pro la subita, granda redukto de la temperaturo per la rapida etendiĝado de la acido karbona kiu eniras la aparaton el ordinara karbon-acidujo. La elpensojn oni nun intencas uzi en hoteloj, restoracioj, hospitaloj (ĉefe hospitaloj sur la militkampoj) kaj en la ordinara familia domo.”

La nova maŝino pro la artafarado de glacio nun fabrikiĝas ĉe la urbo de Epinal en Francujo. La plej grava parto de ĝi estas cilindro en kiu oni povas enmeti kaj ensigeli ĥemiaĵojn kiuj daŭrados tiel longe, kiel la maŝino mem. Alivorte, oni neniam postulas novajn ĥemiaĵojn! La maŝino, turniĝante en akvo, produktas glacieron. Ĝi povas produkti ankaŭ malvarman aeron. Ĝi postulas nek vaporon nek brulaĵon. La pli malgrandajn modelojn oni povas funkciigi per manopovo. Oni diras ke ĝi estas la unua “glacio-maŝino,” kiu ne postulas pli-malpli novajn ĥemiaĵojn.

Por kelkaj fervojaj oficiroj, ĉe New Haven, Connecticut, antaŭ nelonge, oni faris provon pruvonte la uzeblecon de fluida aero por anstataŭi glacieron en la vagonoj fervojaj por la transportado de komercaĵoj pereemaj. Nova kompanio nun organiziĝas por la produktado de fluida aero por ĉia malvarmigado kaj ĝi anoncas ke ĝi povas produkti aeron fluidan po multe malpli ol dek cendoj (20 sd.) ĉiu *gallon* (3.78 litroj). Oni povas nur esperi ke iu iam trovos bonan metodon por eviti la grandegan elspezadon por glacio!

**Profunda diskuto, senfina disputo, kaj lacegiganta *por-worwin*'
Malhelpas la puŝon; ni fermu la buŝon, kaj rapidegiĝu antaŭen!**

LA FANFARONULO

Du indianoj, unu juna, unu maljuna, vestitaj per la unifarmo de indianestroj, el globetumitaj feloj, kun ĉirkaŭkapoj ornamitaj per plumegoj, venis antaŭen ĝis la rando de la altetaĵo. Ili postulis interparolon kun la kapitano, kaj Fonson elvenis kaj renkontis ilin. “Mi estas la kapitano,” li diris. “Kion vi deziras?”

“Ni deziras tiun viron kiu mortigis unu el niaj virinoj hodiaŭ,” respondis la estro maljuna.

“Li ne ĉeestas, li lasis nin.”

La estro rigardis malsupren dum kelkaj sekundoj kvazaŭ pensante; tiam per voĉo profunda kaj forta, kvankam ne laŭta, li paroladis jene:

“Kapitano, tio ne sufiĉas. Vi pensis ke neniu vin vidis, sed ni estas tiel konstante spionintaj vin post kiam vi eniris la rezervaĵon ke, se unu sola viro vin lasus, ni estus vidintaj lin. Ni havas nenan malpacon kontraŭ vi. Ni estas vendintaj tiun ĉi landon al la Regantaro, konsentante foriri de ĝi en certa tempolimo, kaj kiam venos tiu tempo ni ne estos tie ĉi. Sed ni ja ne povas permesi, ke oni mortigu niajn virinojn tiamaniere, kiel bestojn. Vi metu vin mem en nian lokon. Se tiu estus unu el viaj virinoj kaj indiano estus mortiginta ŝin, ĉu vi postulus revenĝon, aŭ ne? Ni ne estas maljustaj: ni deziras puni neniun krom la kulpa. Tiu viro ĉeestas ĉe vi kaj ni deziras lin teni. Lin donu al ni, por ke ni punu lin laŭ nia volo, kaj vi estos tie ĉi tiel maldanĝera kiel inter loĝejoj de la blankuloj. Sed ni estas venintaj por preni lin kaj ni tion faros, eĉ se ni devos samtempe mortigi vin ĉiujn. Rigardu! Ni estas kvin cent. Nun elektu.”

“Ĉu vi lin rekonus?” la kapitano demandis.

“Elkonduku lin kun du aliaj viroj,” diris la juna estro, kaj, se ni ne tuj montros lin, ni permesos al vi ĉiuj resti liberaj—ni tuŝos neniun el vi.”

Kapitano Fonson reiris en la tendon. McDerny estis

CHARLES E. BAKER

samtempe peteginta la soldatojn ke ili ekbatalu, sed sen-sukcese; neniuj volis preni sur sin la konsekvencon de la malspriteco de la juna fanfaronulo. Kaj nun la heroaĉo komencis peti Fonson ke li lin ne fordonu. Sed Fonson diris, "McDerny, mi diris al vi ke vi tion ne faru, kaj kiam vi levis vian pafilon mi diris al vi 'mallevu ĝin.' Mi ja ne respondas por viro kiu malobeas miajn komandojn. Se ni militus por vi, cent viroj mortus anstataŭ unu, kaj nia morto ankaŭ ne helpus vin. Vi senkaŭze endanĝerigis nin ĉiujn kaj tiel perdis vian tutan rajton je nia protektado. Vi faris tion ĉi al vi mem, kaj vi simple devegos "antaŭstari la muzikon" (=ricevi la konsekvencon).

Oni elektis du virojn kaj elmarŝigis ilin kun McDerny. Ĉiuj tri estis tre palaj, sed la kulpulo tremegis kiel folio, kaj iu povus elmontri lin.

"Tiu ĉi estas la viro," diris la juna estro, montrante McDerny.

La kapitano gestis per sia mano. "Tre bone," li diris, "lin prenu kaj faru al li laŭ via volo."

La maljuna estro parolis denove: "Kapitano, se plaĉas al vi, ni deziras, ke vi elkonduku viajn militistojn por ĉe-esti ĉe la ekzekuto."

La tuta forto de McDerny ŝajne forlasis lin; li sciis ke li estas nehelveble kondamnita kaj li faris nenian reziston. Duone subtenante lin, la estro juna kaj alia indiano kondukis lin malmultajn paŝojn flanken kaj tie, la tuta blankularo starante duonronde kun siaj dorsoj je la altetaĵo, kaj la rondo el indianoj ĉirkaŭante ilin ĉiujn, komencis la ekzekuton. Ilia metodo por fini la vivon de la kondamnito estis sendube surprizo ambaŭ al la mortonto kaj la aliaj blankuloj, ĉar ili senhaŭtigis lin dum li ankoraŭ vivis.

Post kiam oni deŝiris la vestojn la juna estro per kelkaj frapoj lertaj de akra tranĉilo faris tranĉaĵon en la haŭto, de la kapsupro ambaŭflanke ĝis la sultroj kaj laŭ la brakoj ĝis

LA FANFARONULO

la manoj. Tiam du aliaj indianoj detiris la haŭton de la brakoj kaj deŝiris ĝin de la kapo ĝis la talio. La juna estro diris, "Staru kiel viro kaj renkontu vian sorton." Kaj McDerny, kredeble tro terurigita por fari alie, nur ĝemis. Unu ĉirkaŭprenis lin sub la brakoj kaj aliaj deŝiris lian haŭton tiel facile kvazaŭ li estus leporo—nek unu kvadrata colo da haŭto, nek ungo aŭ de mano aŭ piedo restis al li. Tiam ili kuŝigis lin sur la herbon, la juna estro ĵetis la haŭton sur sian ŝultron kaj ili formarŝis.

La maljuna estro parolis unufoje plu: "Kapitano, re-eniru, manĝu kaj dormu, sed nenion timu. Ni kaj vi ne estas malamikoj." Tiam li kriegis al sia gento en sia propra ĵargono kaj tiuj tuj komencis malaperi kaj miksi sin en la mallumon. Post kvin minutoj neniu el ili restis videbla. Neniu indiano escepte la du estroj estis parolinta solan vorton, kaj se ne estus la mortanto tie kuŝanta sur la herbejo, la tuta farado povus ŝajni monstra terursonĝo.

McDerny diris ke li elbrulas kaj trifoje petis akvon, kiun oni donis al li, kaj li trinkis. Li diris ke lia sorto estas justa, sed li ne antaŭe povus pensi, ke ĝi estos tiela. Dek kvin minutojn post kiam lia haŭto deĝis, li estis malviva.

Oni ĉirkaŭfaldis la mortinton per drapo kaj du lankovriloj kaj enterigis lin tiun nokton en la centro de la altetaĵo.

La morgaŭan tagon la grupo reiris sian vojon kaj post nelonge atingis sian celon, kie ili elmezuris la urblokon nemalhelpate de la indianoj. La promeso de la indianestro restis nerompata, kiel ĉiuj antaŭsciis. Multaj el la indianoj venis kaj komercis kun la blankuloj dum tiuj ĉi laboris, sed ili montris neniom da tiu sovaĝa karaktero, kiun ili plene pruvis, ke ili havas, tiun nokton ĉe la altetaĵo.

LA BIRDO EN LA NEĜO

Pasiginte multajn horojn en ĝemegoj kaj petoj al Dio, por povi elteni sian malfeliĉon, li decidiĝis petegi la kompatemon; sed ankoraŭ la suferanto volis kaŝi la humiliĝon, kaj decidis kanti tra la stratoj nur dum la noktoj. Li posedis mezokvalitan voĉon, kaj li konis la kantarton ĝis perfekteco; sed li renkontis la malfacilecon, ke li ne havis ilon por sin akompani. Fine alia malfeliĉulo, kiu ne ĝi estis tiom, kiom li, havigis al li gitaron malnovan kaj rompitan, kaj post kiam li reordigis ĝin kiel eble plej bone kaj verŝis multegajn larmojn, li eliris dum unu nokto de Decembro al la strato. Bategis lia koro; tremis liaj kruroj; kiam li volis ekkanti en unu el la plej centraj stratoj, li ne povis; la doloro kaj la honto estis formintaj nudon en lia gorĝo. Li apogis sin kontraŭ dommuron, ripozetis dum kelkaj momentoj, kaj iom mallacigite li komencis kanti la tenorromancon el la unua akto de "La Favoritino." La pasantoj iĝis tuj atentaj ĉe la vido de blindulo, kiu ne kantis sevilaĵojn aŭ malagaĵojn. Oni faris rondon ĉirkaŭ li, kaj ne malmultaj, observinte la majstrecon, laŭ kiu li venkis la malfacilecojn de la verko, sciigis unu al la alia mallaŭte sian surprizon kaj metis kelkajn spesdekojn en la ĉapelon, kiun li pendigis de la brako. Fininte la romancon, li komencis la arion el la kvara akto de "L' Afrikanino." Sed jam kunvenis tro da homoj en lia ĉirkaŭo, kaj la estraro timis, ke tio ĉi estos kaŭzo por ia malordo; ĉar estis afero nedubbla por la oficistoj de l' ordo publika, ke la personoj, kiuj kunvenas en strato por aŭskulti blindulon elmontras per tiu ĉi faro agemecon nekunigeblan kun la socia ordo kaj la regna sendanĝereco. Tial unu policano ekkaptis Johanon energie ĉe la brako kaj diris al li:

"Ho he! vi reiru tuj al via domo, kaj ne restadu en ia strato."

"Sed mi ja neniun difektas."

"Vi malhelpas la interkomunikiĝojn. Antaŭen, antaŭen, se vi ne volas iri al la policejo!"

OTTO HAUX MAYER

Estas vere konsole vidi, kiel fervore la regnestro zorgadas pri tio, ke la publikaj stratoj troviĝu ĉiam liberaj de blinduloj, kiuj kantas. Kaj, kiu ajn aperos por subteni malan opinionon, mi kredas, ke, se ĝi povus konservi la stratojn tiel same liberaj de ŝtelistoj kaj mortigistoj, ĝi plezure farus tion ĉi.

La malfeliĉa Johano reiris al sia ĉambraĉo, malĝoja (ĉar li havis bonan koron) pro tio, ke li metis en danĝeron dum unu minuto la internan pacon kaj okazigis intervenon de la reganta aŭtoritato. Li estis enspezinta kvin realojn (po dek spesdekoj) kaj unu dekcentimon (=4 spesdekoj). Por tiu ĉi mono li manĝis la sekvantan tagon kaj pagis la luprezon de la mizera pajlmatraco, sur kiu li dormis. En la vespero li denove eliris kaj kantis pecojn de operoj kaj kantaĵojn; ree kolektiĝis la homoj ĉirkaŭ li, kaj ree intermetis sin la estraro, alkriante lin energie:

“Antaŭen, antaŭen!”

Sed se li iris antaŭen, li ne enspezis unu spesdekon, ĉar la pasantoj ne povis aŭskulti lin! Tamen Johano iris ĉiam antaŭen, ĉar pli ol la morto tremigis lin la ideo, ke li malobeas la leĝojn de la registaro kaj interrompas, eĉ se estus nur momente, la ordon de sia patrujo.

Ĉiun nokton liaj enspezoj malpliĝis: Sur unu flanko la neceso iradi ĉiam antaŭen, kaj sur la alia la manko de novaĵo, kiun oni en Hispanujo ĉiam pagas tre multakoste, forprenis de li ĉiutage kelkajn spesdekojn. Por tiuj, kiujn reirante li portis hejmen, li apenaŭ povis enigi ion en la stomakon, por ne morti de malsato. Lia situacio jam estis malesperiga. Nur unu luman punkton la suferanto obstine vidadis inter la mallumo de sia ĉagrenega stato: tiu ĉi luma punkto estis la alveno de lia frato Santiago. Ĉiunokte, kiam li eliris de hejme, kun la gitaro pendigita de ĉirkaŭ la kolo, la sama penso okazis al li: “Se Santiago estus en Madrido kaj aŭskultus min kantantan, li ekkonus min per la voĉo.”

LA BIRDO EN LA NEĜO

Kaj tiu ĉi espero, pli bone tiu ĉi ĥimero, estis la solo, kio donis al li fortojn por elteni la vivon.

Tamen venis alia tago, kiam la timego kaj la doloro ne konis limojn. La antaŭan nokton li enspezis nur ses spersedekojn. Li estis sentinta sin tiom malvarma! Vekiĝis ja Madrido, envolvita en neĝa tuko de alteco de duone etendita mano. Kaj la tutan tagon daŭris la neĝado, ne haltante momenton. Tio lasis la plejmulton de la homoj senzorga, kaj estis motivo por amuzo al multaj estetikemuloj. Antaŭ ĉiuj la poetoj, kiuj ĝuadis komfortan situacion, pasigis grandan parton de la tago rigardante la falantajn neĝerojn tra la fenestraj vitroj de siaj studejoj kaj elpensante metaforojn beletajn kaj spritajn, tiajn, kiaj igas la publikon voki en la teatro: "Bravel brave!" aŭ kiaj, legataj en volumo da versaĵoj, kaŭzas ĉkkrii: "Kian talenton havas tiu ĉi junulo!"

Johano ne estis gustuminta pli da nutraĵo ol tason da kafo de plej malalta kvalito, kaj bulketon. Li ne povis silentigi la malsaton per rigardado al la neĝo; unue, ĉar li ne povis vidi; kaj due, ĉar eĉ se li povus, estus malfacile distingi ĝin tra la vitro prujnkovrita kaj malpura de lia mansardo. Li pasigis la tagon, kaŭrante sur sia matraco, kun la memoro pri la tagoj de l' infaneco, kaj nutrante la dolĉan manion pri la reveno de sia frato. Ĉe noktigo, urĝite de la neceseco, senfortigite, li iris malsupren al la strato, por peti almozon. Li jam ne havis gitaron; li ĝin vendis por tri pesetoj (=unu spesmilo) dum simila momento de mizero.

La neĝo falis ankoraŭ kun la sama persisteco, oni povas diri kun la sama atakemeco. La kruroj tremis al la malfeliĉa blindulo, tiel same, kiel la unuan tagon, kiam li iris por kanti; sed tiun ĉi fojon ĝi ne estis de honto, sed de malsato. Li iris antaŭen tra la stratoj kiel ajn li povis, paŝetante en la koton ĝis super la maleoloj; la oreloj diris al li, ke preskaŭ neniu pasis laŭlarĝe; ja veturiloj ne faris bruon, kaj li

OTTO HAUX MAYER

estis en danĝero, ke unu veturos super lin. En strato plej centra li ekkantis fine la unuan operpecon, kiu alvenis sur liajn lipojn; la voĉo eliris malforta kaj raŭka el la gorĝo; neniŭ alproksimiĝis al li, ne eĉ de scivolo. "Mi iru aliloken," li diris al si mem, kaj iris malsupren tra la Stratego San Jeronimo (*elparolu*: Ĥero'nimo), paŝante malvigle tra sur la neĝo, dum blanka kvazaŭvualo jam kovris lin, kaj la piedoj gutadis akvon. La malvarmo penetris liajn ostojn; la malsato kaŭzis al li fortan doloron en la stomako. Venis momento, kiam la malvarmo kaj la doloro lin premegis tiom, ke li sin sentis eksvenanta. Li kredis, ke li mortos, kaj levante la animon al la Virgulino del Carmen (*elparolu*: Karmen), sia protektantino, li ekkriis per timegema voĉo: "Patrino mia, helpu min!" Kaj post kiam li eldiris tiujn ĉi vortojn, li sentis sin iomete pli bone kaj paŝis, aŭ pli korekte treniĝis, ĝis la placo de las Cortes (*elparolu*: Cortes); tie li apogis sin kontraŭ lanternan foston, kaj, ankoraŭ sub la impreso de l' helpe de la Virgulino, komencis kanti la Ave-Marion de Gounod (*elparolu*: Guno), melodio, por kiu li ĉiam havis multan emon. Sed ankaŭ alproksimiĝis neniŭ. La loĝantoj de l' urbo troviĝis ĉiuj en la kafejoj kaj teatroj, aŭ en siaj hejmoj, igante siajn infanojn danci sur la genuoj apud la kameno. Nerapide kaj amase faladis la neĝo, laŭ plena decido liveri temon dum la sekvanta tago al ĉiuj raportistoj de gazetoj por ravi siajn anojn per dek-duo da graciaj diroj. La okaze pasantaj paŝis rapide, envolvite en siajn surtutojn kaj kovrante sin per la pluvombrelo. La lanternoj estis surmetintaj la blankan dormoĉapon kaj ellasetis melankolian helecon. Nenia bruoj aŭdiĝis krom neklara kaj malproksima krakado de la veturiloj kaj senĉesa falado de la neĝeroj, kiel malpezega kaj longigita murmurado de silkaĵo. Nur la voĉo de Johano vibris tra en la nokta silento, salutante la Patrino de l' Forlasitoj. Kaj lia kanto, pli ol saluta himno,

LA BIRDO EN LA NEĜO

ŝajnis angora krio kelkajn fojojn ; aliajn malgaja kaj rezignacia ĝemo, kiu frostigis la koron pli ol la malvarmo de la neĝo.

Vane plendis la blindulo dum longa tempo, petante helpon de l' ĉielo ; vane li ripetadis la dolĉan nomon Marion sennombrafoje, alfarante ĝin al la diversaj tonoj de l' melodio. La ĉielo kaj la Virgulino estadis malproksime, laŭ la ŝajno, kaj ne aŭdis ; la najbaroj de l' placo estis proksime, sed ili ne volis lin aŭskulti. Neniu venis malsupren, por akcepti lin ; ne eĉ balkono malfermiĝis, por lasi fali sur lin kupran moneron. La pasantoj, kvazaŭ ili estus persekutataj de la pulmonio, ne kuraĝis halti.

Fine li jam ne povis kanti plu ; la voĉo ekmortis en la gorĝo ; li komencis perdi la sentadon en la manoj. Li faris kelkajn paŝojn kaj sidigis sin sur la trotuaro, ĉe l' piedo de la krado, kiu ĉirkaŭas la ĝardenon. Li apogis la kubutojn sur la genuojn kaj metis la kapon inter la manojn. Kaj li pensis malklare pri tio, ke venis la lasta momento de lia vivo. Kaj li daŭrigis preĝi kun ardo, petegante la dian kompatemecon.

Post iom da tempo li ekvidis, ke unu pasanto haltas antaŭ li, kaj li sentis sin kaptita ĉe la brakoj. Li levis la kapon, kaj supozante, ke estas la ordinaro, li demandis time :

“Ĉu vi estas policano ?”

“Mi ne estas policano,” respondis la pasanto, “sed leviĝu do.”

“Apenaŭ mi povas, sinjoro.”

“Ĉu vi troviĝas tre malvarma ?”

“Jes sinjoro . . . kaj krom tio, mi ne manĝis hodiaŭ.”

“Do mi helpos vin. . . nu. . . ja. . . leviĝu !”

La sinjoro ekkaptis Johanon ĉe la brakoj kaj metis lin sur la piedojn ; li estis forta homo.

“Nun apogu vin bone sur min, kaj ni vidu, ĉu ni trovos

AMERIKA ESPERANTISTO

OTTO HAUX MAYER

veturilon.”

“Sed kien vi min kondukas ?”

“Al nenia malbona loko ; Ĉu vi timas ?”

“Ha ! ne ; la koro diras al mi, ke vi estas kompatema persono.”

“Iru ni antaŭen . . . vidu ni, ĉu ni venos baldaŭ hejmen, por ke vi sekigu vin kaj manĝu ion varman.”

“Dio ĝin pagos al vi, sinjoro . . . la Virgulino ĝin pagos . . . Mi kredis, ke mi formortos en tiu ĉi loko.”

“Nenio pri formorto . . . Jam ne parolu pri tio. Estas necese nun trovi tuj fiakron . . . Ni iru antaŭen . . . Kio estas tio ; Ĉu vi faletas ?”

“Jes, sinjoro ; mi kredas, ke mi puŝiĝis kontraŭ lanternan foston . . . Mi ja estas blinda.”

“Ĉu vi estas blinda ?” demandis vivece la nekonata.

“Jes, sinjoro.”

“De kiam ?”

“De kiam mi naskiĝis.”

Johano sentis la brakon de sia protektanto ekstremiti, kaj ili pasis pluen silente. Fine la nekonata haltis momente kaj demandis lin per voĉo ekscitita :

“Kiel vi estas nomata ?”

“Johano.”

“Johano kio ?”

“Johano Martinez” (*elparolu*: Martines).

“Via patro Manuelo, ĉu ne vere ? Ĉefo de orkestro en la tria artileria regimento, ĉu ne estas certe ?

“Jes sinjoro.”

En la sama momento la blindulo sentis sin premata de duo da fortaj brakoj, kiuj preskaŭ lin sufokis, kaj li aŭdis en sia orelo voĉon tremantan, kiu ekkriis :

“Dio mia, kia teruro kaj kia feliĉeco ! Mi estas krimulo ; mi estas via frato Santiago.”

Kaj la du fratoj haltis en la mezo de la strato dum

LA BIRDO EN LA NEĜO

kelkaj minutoj, ĉirkaŭprenante unu la alian kaj plorante laŭte. La neĝo defalis dolĉe sur ilin.

Santiago elteris sin subite el la brakoj de sia frato kaj komencis krii, spicante siajn vortojn per fortaj interjekcioj:

“Fiakro! fiakro! ĉu ne estas fiakro proksime? . . . Malbenita estu mia sorto! Venu, Joĉjo, ekpenu iom: ni venos baldaŭ al haltejo . . . Sed, ho he! kie do estas la fiakroj? . . . Ne unu sola pasas ĉi tie . . . Jen alia . . . ĝi tiu jam estas mia. Jen, veturigisto, . . . kvin dolarojn (=10 Sm.), se vi alportos nin fluge al la domo numero 10-a, Stratego Castellana!” (*elparolu*: Kasteljana.)

Kaj ekkaptante sian fraton en la brakoj, kvazaŭ li estus infano, li metis lin en la fiakron, kaj poste li mem enrampis. La veturigisto ekpelis la beston, kaj la kaleŝo glitis rapide kaj senbrue tra sur la neĝo. Dum ili veturis, Santiago, ĉiam tenante la malfeliĉan blindulon en la brakoj, rakontis al li rapide sian vivon. Li ne estis en Kubo, sed en Kostariko, kie li akiris kontentigan havon; sed li pasigis multajn jarojn sur la kamparo, preskaŭ sen interkomunikiĝoj kun Eŭropo; li skribis tri aŭ kvar fojojn per la barkoj, kiuj veturas Anglujon, kaj ne ricevis respondon. Kaj pensante ĉiam, ke li reiros Hispanujon dum la sekvanta jaro, li malatentis esploradi kaj intencis fari al ili agrablan surprizon. Poste li edziĝis, kaj tiu ĉi okazo tre prokrastis lian revenon. Sed de kvar monatoj li nun estis en Madrido, kie li eksciis per la preĝeja registro, ke lia patro mortis; pri Johano oni donis al li neklarajn kaj malakordiĝajn raportojn; unuj diris al li, ke li mortis ankaŭ; aliaj, ke, submetite al ekstrema mizero, li iris tra la mondo, kantante kaj ludante la gitaron. Kiajn ajn penadojn li faris, por eltrovi lian estejon, estis sensukcesaj. Feliĉe la Alta Antaŭzorgo prenis sur sin, ke ĝi kondukis lin en liajn brakojn. Santiago ridis unujn fojojn, ploris aliajn, montrante ĉiam la sinceran, noblan kaj gajan karakteron de la knabaj jaroj.

OTTO HAUX MAYER

Fine la fiakro haltis. Servanto venis, por malfermi la pordon. Preskaŭ flugeo ni kondukis Johanon en la domon. Enpaŝante li sentis varmetan temperaturon, la aromon de bonstato, kiun la riĉeco disvastigas; liaj piedoj eniĝis en molan tapiŝon; laŭ ordono de Santiago du servantoj lin senvestigis tuj de liaj ĉifonoj moligitaj de l' akvo, kaj metis ĉirkaŭ lin puran kaj ŝirmantan vestaĵon. Tiam ili servis al li en la sama kabineto, kie ĉarmega fajro brulis, tason da fortiga supo kaj poste kelkajn manĝaĵojn, kvankam kun bezona singardo, pro la malforteco, sub kiu lia stomako devis suferi; krom tio, ili suprenportis el la kelo la plej elektitan kaj malnovan vinon. Santiago ne ĉesis moviĝi, donante la konvenajn ordonojn kaj alpaŝante ĉiumomente al la blindulo, por demandi lin zorge:

“Kiel vi statas nun, Johano? Ĉu vi sentas vin bona? Ĉu vi deziras pli da vino? Ĉu vi bezonas pluan vestaĵon?”

Post finiĝo de la manĝeto, ambaŭ restis kelkajn momentojn apud la kameno. Santiago demandis servanton, ĉu la mastrino kaj la infanoj jam kuŝiĝis, kaj post kiam tiu ĉi jesis, li diris plene de ĝojo al sia frato:

“Ĉu vi ne ludas fortepiane?”

“Jes.”

“Do ni faru teruron al mia edzino kaj al miaj infanoj. Venu en la salonon.” Kaj li kondukis lin, ĝis li sidigis lin antaŭ la fortepiano. Tiam li levis la kovrilon, por ke oni aŭdu pli bone, malfermis zorge la pordojn kaj plenumis ĉiujn preparojn, kiuj kaŭzos surprizon en la domo.

La blindulo komencis ludi militan marŝon. La silenta domo tuj ekstremis, kvazaŭ muzika skatolo post ekstreĉo. Are elfluegis la notoj el la fortepiano, sed ĉiam laŭ ritmo batala. Santiago ekkriis de tempo al tempo:

“Pli forte, Joĉjo, pli forte!”

Kaj la blindulo frapegadis la klavaron, ĉiufoje kun pli da energio.

LA BIRDO EN LA NEĜO

“Jam mi vidas mian edzinon post la kurtenoj . . . , antaŭen, Joĉjo, antaŭen! . . . La kompatindulino! Si staras en la ĉemizo . . . hi . . . hi . . . mi ŝajnigas, kvazaŭ mi ne vidas ŝin . . . ŝi kredos, ke mi estas freneza . . . hi hi! . . . antaŭen, Joĉjo, antaŭen!”

Johano obeis sian fraton, kvankam jam nevolonte, ĉar li deziris ekkoni sian bofratinon kaj kisi siajn genevojn.

“Nun mi vidas mian filinon Manuenjon, kiu ankaŭ elvenas en la ĉemizo . . . ; kio do, ankaŭ Francjo vekigis! . . . Ĉu mi ne diris al vi, ke ĉiuj ricevos teruron! . . . Sed ili malvarmumos, se ili tiamaniere iros ĉirkaŭe pli longatempe . . . Ne ludu plu, Johano, ne ludu plu.”

Ĉesis la inferna bruo.

“Nu, Adelino, Manuenjo, Francjo, vestu vin iomete kaj venu por ĉirkaŭpreni mian fraton Johanon. Jen Johano, pri kiu mi tiom al vi parolis, kiun mi ĵus trovis sur la strato, ekmortontan de frosto en la neĝo . . . Iru, vestu vin tuj!”

La nobla familio de Santiago alrapidis por ĉirkaŭpreni la malfeliĉan blindulon. La voĉo de la edzino estis dolĉa kaj harmonia; Johano kredis, ke li aŭdas tiun de la Virgulino; li rimarkis, ke ŝi ploras, dum ŝia edzo rakontis, kiamaniere li trovis lin. Kaj ŝi volis eĉ aldoni pli da zorgemeco al tiu de Santiago; ŝi alportigis varmigantaĵon kaj ĝin metis mem sub liajn piedojn; poste ŝi envolvis la piedojn en kovraĵon kaj metis velurĉapon sur lian kapon. La infanoj saltetis ĉirkaŭ la apogseĝon, karesante sian onklon kaj ricevante liajn karesojn. Ĉiuj aŭskultis silentaj kaj kortuŝegitaj la mallongan rakonton, kiun li faris al ili pri siaj suferadoj. Santiago batis sian kapon; lia edzino ploris; la malgranduloj konsternitaj diris al li, premante lian manon: “Vi ja ne malsatos denove nek iros sur la straton sen pluvombrelo, ĉu ne vere, onĉjo? . . . Mi ne volas ĝin, Manuenjo ankaŭ ne . . . nek paĉjo, nek panjo.”

OTTO HAUX MAYER

“Nu do, Francjo, kion vi diras! Mi scias, ke vi ne donos al li vian liton!” diris Santiago, subite fariĝante gaja.

“Li ja ne estas alkonvena por ĝi, paĉjo! En la ĉambrego staras ankoraŭ unu, tre granda, tre granda, tre!”

“Mi nun ne volas liton,” interrompis Johano. Mi troviĝas tiom bone ĉi tie!

“Ĉu doloras vin ankoraŭ la stomako, kiel antaŭe?” demandis Manuenjo, ĉirkaŭprenante kaj kisante lin.

“Ne filino mia, ne, estu benita! . . . nenio doloras min . . . mi sentas min tre feliĉa . . . nur sole dormema mi estas . . . miaj okuloj fermas sin, kaj mi ne povas ĝin malhelpi . . .”

“Nu, ne atentu nin do, Johano, sed dormu kviete!” diris Santiago.

“Jes, onĉjo, dormu, dormu,” diris samtempe Manuenjo kaj Francjo, ŝetante la brakojn ĉirkaŭ lian kolon kaj kovrante lin per karesoj.

.

Kaj efektive li endormiĝis. Kaj li vekigis en la ĉielo.

Ĉe la sekvanta mateniĝo, unu oficisto de ordo publika renkontiĝis kontraŭ lian kadavron inter la neĝo. La kuracisto de l' ambulanca stacio certigis, ke li mortis per frostiĝo de la sango.

“Ekvidu, Jimenez” (*elparolu*: Ĥimenes), diris al sia kunulo unu el la policanoj, kiuj lin portis. “Ŝajnas, kvazaŭ li ridus!”

CIRKULERO DE LA KVARO POR LA KVARA

Apenaŭ la lasta brilo de la glora tria kongreso estingiĝis, kaj jam la unuaj radioj de la kvara estas videblaj. La gesamideanoj jam scias, ke en Kembriĝ' Germanujo invitis la Esperantistaron; la urbo restis ankoraŭ nedefinita. Nun Germanujo, en harmonio kun la Centra Organiza Komitato kaj kun la konsento de Dro. Zamenhof elektis Dresden' kiel la plej taŭgan urbon.

La bela saksa ĉefurbo havas tre oportunan situacion. Ĝi nek estas nordgermana nek suda urbo, ĝuste en bona mezo de Germanujo ĝi kuŝas, facile atingebla por ĉiuj landoj. La Kvaro, kiu aranĝos la kongreson, estas: Dro. Mybs, Dro. Schramm, Sino. Hankel kaj Sro. Arnhold. Tiu ĉi kvaro ĉion faros, por faciligi al la kongresontoj la vojaĝon kaj la loĝadon. La Societo por la Interkomunikiĝo de la Fremduloj (*Fremdenverkehrverein*) tre afable proponis al la kvaro sian helpon; per kunagado kun tiu ĉi Societo la kvaro aranĝos malkaran restadon al niaj gastoj. Kun kora gastemeco ni ilin atendas, entuziasme ni ilin akceptos! La malnovaj amikoj revidos unu la aliajn, novaj ligoj fariĝos,

pli intime la granda familio unuiĝos. En la lando de la scienco tre granda ekspozicio montros la riĉan literaturon de nia lingvo.

Post la kongreso ekskursoj tra Germanujo estos aranĝataj; ni esperas, ke multaj Esperantistoj partoprenos. Tiuj el ili, kiuj preferas la viziton kaj restadon en trankvila "Esperanto Vilaĝo" trovos en Weisser Hirsch la deziratan ĉarman lokon, veran Esperantistujon. Jam nun oni tie aranĝis kursojn.

La sukceso de niaj entreprenoj dependas de la multnombra apero de la gesamideanoj. Ĉiuj nacioj estu bone reprezentotaj! Ni petas, ke oni baldaŭ anoncuan nomon kaj profesion klare skribitan, kun detala adreso al la oficejo de la kvara, kiu restos ĝis la definitiva translokiĝo al Dresden (en komenco de somero 1908) ĉe la Prezidanto Dro. Mybs, Altona a. E., Markstr. 68. Ankaŭ ne forgesu la donacan kasan kaj la garantian fondaĵon, ĉar ni bezonas multe da mono. Ni do petas, ke oni sendu ĉiujn monojn al la bankejo Fratoj Arnhold (Gebr.) Dresden, Waisenhausstrasse 20.

EL RUSA DE TURGENEFF

Tradukis Max Brodkey

Mi vidas grandegan konstruaĵon. Je la antaŭa muro mallarĝa pordo staras plene malfermita. Post la pordo terura mallumeco. Antaŭ la alta sojlo staras fraŭlino. Rusa fraŭlino. La netravid-ebla mallumeco elspiras malvarmecon, kaj kune kun la elspirata malvarmo elportiĝas el la profundeco mallaŭta raŭka voĉo:

"Ho! Ci volas trapaŝi tiun ĉi sojlon? Ĉu ci scias kio atendas cin interne?"

"Mi scias," respondis la fraŭlino.

"Malvarmo, malsato, moko, males-timo, malhonoro, mallibereco, malsano, la morto mem."

"Mi scias."

"Tuta forfremdiĝeco, soleco."

"Mi scias; mi estas preta elporti ĉiujn

suferojn, ĉiujn batojn.”

“Ne sole de malamikoj, sed ankaŭ de amikoj.”

“Jes, kaj de ili.”

“Bone. Ĉu vi estas preta por la oferaĵo?”

“Jes.”

“Por sennoma oferaĵo ci pereos kaj neniu . . . neniu ekscios kies memoron honori.”

“Mi deziras nek dankon nek kompaton, mi ne deziras nomomemoraĵon.”

“Ĉu vi estas preta . . . eĉ krimigi.”

La fraŭlino levis sian kapon. “Jes,

mi ankaŭ estas preta eĉ krimigi.”

La voĉo ĉesis kaj post iom da tempo denove ekdemandis: “Ĉu ci scias ke ci iam eble sangos ciajn konvinkojn kaj povus ekkompreni ke ci eraradis kaj ke ci senuze mortigis cian junan vivon.”

“Tion mi ankaŭ scias. Tamen, mi volas eniri.”

“Eniru!”

La fraŭlino trapaŝis la sojlon kaj peza baro defalis post ŝi.

“Malsaĝulino!” ekraŭkis iu poste.

“Sanktulino!” venis de ialoke respondo.

ŜERCETOJ

Kiamaniere Li Fariĝis Homruinaĵo

Okazis antaŭnelonge, ke grandkorpa sanega irlandanino eniris novjorkan juĝejon kaj faris plendon kontraŭ sia edzo, kulpigante al li esti batinta ŝin. La kulpigato estis kurbŝultra hometo, kiu aspektas kvazaŭ oni jam lin pasigis tra draŝmaŝino. Apenaŭ li povis stari surpiede. La juĝisto, rigardante la paron tra okuloj eligantaj amuzbrileton, diris al la virinego:

“Vi plendas, ke ĉi tiu vin batis?”

“Ho ne, li ne batis, sed li faligis min per pugnafrapo.”

“Kaj vi esperas kredigi min, ke vi estis faligata de tia homruinaĵo?”

“Se plaĉas al Via Juĝista Moŝto, li estas homruinaĵo nur de kiam li pugnofrapis min.

—W. J. P.

Ŝi (al sia edzo).—La kompatindaj infanoj! kiam vi leviĝas matene ili jam iris lernejon, kaj kiam vi nokte revenas el la drinkejo ili jam kuŝiĝas. Ĉu vi ne povas alsendi al ili almenaŭ memoraĵan poŝtan karton?

Dentisto.—Antaŭ pli ol tri monatoj mi faris por Barono Senmono novan dentaron. Nu, lastan sabaton mi iris al li

por ricevi la monon kiun li ŝuldas al mi por la ellaboraĵo. Kion vi supozas? Li ne nur rifuzis min pagi, sed eĉ havis la senhontecon grinci je mi—per miaj dentoj!

W. M. Ampt, Cincinnati

Maljunan vidvinon en ŝuo loĝana

Klopodigis senhalte arego infana.

Ŝi donis do supan senĉanan manĝeton,—

Kuŝigis batitan ĉiun “esperanteton.”

—W. J. P.

Ŝi.—Peĉjo, ĉu vi mortus por mi?

Li.—Jes, karulino, vi scias, ke mi mortus por vi.

Ŝi.—Por kiom ka mono via vivasekuro estas?

—Sro. Grover Peacock, Cincinnati

La bona fino alportis al unu infano pecon da plumbo kaj pecon da oro kaj metis ilin ambaŭ antaŭ li.

“Elektu!” ŝi diris, simple.

La infano pensis momenton, kaj elektis la plumbon.

“Ĝi ne estas pli peza por porti, estas tute tiel bona por manĝi, kaj ĝi ne igos, ke ĉiu min malamu!” diris li.

La bona fino ridis. “Vi povas esti feliĉa sen helpo de mi,” ŝi pepis, kaj forflugis.

UNU VORTO PRI TRADUKOJ

EL "OMAR"

*Versaĵa libro sub la branĉo kun mi,
Bulko da pan', kruĉo da vin', kaj vi
Kantanta ĉe mi en sovaĝa land—
Sovaĝa? Paradiza—pli!*

Tradukis Geoghegan

Kiam ajn oni tradukas rakontojn, librojn aŭ aliajn literaturaĵojn, estas dezirinde, ke sciigo pri la fakto publikigi kiel eble plej vaste. Alimaniere, oni ofte malŝparas tempon tradukante verkon jam tradukitan. Nelonge post la eldono de la Komunisto Manifesto, franca profesoro skribis al la tradukinto, dirante, ke li antaŭ du jaroj jam tradukis ĝin. Ni sciigas al niaj legantoj, ke unu el la plej lertaj amerikaj esperantistoj, Sro. Wm. George Adams, nun tradukas la de Stevenson novelon *Treasure Island*. Ĉiam Amerika Esperantisto volonte publikigos sciigon pri tiaj entreprenoj, kaj nun ni speciale petas, ke lertaj tradukistoj sendu al ni nelongajn rakontojn en Esperanto por la literatura fako de la gazeto.

Antaŭ kelkaj monatoj Sro. L. F. Newcomb, esperantisto de Chicago, verkis por *Amerika Esperantisto* tradukon de la poemo de Longfellow, *The Song of Chibiabos*, el *Hiawatha*. Ni ankaŭ ricevis similan tradukon faritan de Sro. Charles E. Baker, sed ĉar la plena traduko de *Hiawatha* farita de Sro. Baker eble aperos baldaŭ en libreto, ni tie ĉi presas la tradukon faritan de Sro. Newcomb, por ke ĝi ne perdiĝu. Ĝi estas bonega, esprimante, laŭ ritmo kaj stilo, la krudan simplecon de la amerika indiano, kvankam iom kolorigita per la idealismo nerepesebla de la poeto.

LA KANTO DE ĈIBIABOS

*Ree kantis Ĉibiabos
Kanton aman, sopirantan,
Dolĉatone kaj penseme,
Malĝojeme, delikate,
Plendan kanton li ekkantis
De fraŭlino pri amato.*

*"Kiam pri la kara mia,
Pri l' amato mi ekpensas,
En la koro lin memoras,
Ho amato! Ho Algonkin!"*

*"Ve! li metis, forironte,
Konkojn ĉirkaŭ kolon mian,
Blankajn, kiel garantion—
Ho amato! Ho Algonkin!"*

*"Lasu min kun vi, li diris,
Iru al patrujo via!
Ha! permesu min! li petis.
Ho amato! Ho Algonkin!"*

*"Malproksime, mi respondis,
Kusa la patrujo mia!
Jes, treege malproksime!
Ho amato! Ho Algonkin!"*

*"Kiam posten mi videtis,
Kie ni disigiĝis, poste,
Min ankoraŭ li rigardis,
Ho amato! Ho Algonkin!"*

*"Jen li staris apud arbo,
Apud arbo defalinta,
Kiu falis en la akvon,
Ho amato! Ho Algonkin!"*

*"Kiam pri la kara mia,
Pri l' amato mi ekpensas,
En la koro lin memoras,
Ho amato! Ho Algonkin!"*

El Longfellow tradukis L. F. Newcomb

Classified Advertising

WE will print in this department little advertisements of any reputable business, requests for correspondence, etc. More than 25,000 people will read this page. If you have something to sell or trade, tell them about it. Rate per line, 10c flat; no discounts, and minimum charge 20c. Single line correspondence address, twice for 20c. International coupons or 1-c stamps.

ONI empresas en tiu ĉi fako anoncetojn pri ia inda afero, petojn pri korespondado, ktp. Pli multaj ol 25,000 homoj legos tiun ĉi paĝon. Se vi havas ion, kion vi deziras aŭ vendi aŭ doni interŝange, anoncu al ili pri ĝi. Po 20 spesdekoj por ĉiu linio. Nenia rabato. Minimuma sumo, 40 Sd. Unu-linia adreso en la fako de korespondado, du monatojn por 40 Sd. Kuponojn aŭ markojn.

Enfakigitaj Anoncetoj

KORESPONDADO = *Correspondence.*

KLARIGO: * signifas, ke oni deziras nur leterojn; * nur poŝtkartojn ilustritajn.

-
- *Fino. Jullien, Voiron, Isere, France.
 - Sro. G. Allard, Hotelo Coomans, Hoofsteeg 12-22, Rotterdam, Holland.
 - *Sro. Henri Coppin, 3 rue Francois-Cuvelle, Douai, France.
 - *Fino. Willmore, The Hydro, Caterham Valley, Surrey, England.
 - *Sro. J. Guillaume, Montouzin, Aube, France.
 - *Sro. G. Jung, 14, rue de la Guerarde, Troyes, Aube, France.
 - Sro. Th. Roniger, Le Locle, Switzerland.
 - *Sro. L. Gallois, Assencieres, Aube, France.
 - *Sro. William Raith, Strato Hans Kospitaj, Roskild, Denmark.
 - *Sro. F. Sarzosa, Strato Elcano, 3, 1^o, Bilbao, Spain.
 - *Sro. P. Pascual, via Massague, 45, Sabadell, Barcelona, Spain.
 - *Sino. Franciskino Igual, Calle Universidad, n^o 54, Barcelona, Spain.
 - *Sro. Gustave Tabresse, Maison Damoy, St. Denis, Seine, France.
 - Sro. V. Jackontov, Pskov, Zavelicje, Russia.
 - Doktoro Jenny, 41, Faubourg Saint Antoine, Chalon-sur-Marne, France.
 - *Sro. Richard Humphrey, Milton, New Zealand.
 - *Sro. Gabriel de Callejon, Dalias, Almeida, Spain.
 - *Fino. G. Hodgson, 66, Cholmley Street, Hull, England.
 - *Sro. W. Whitworth, 72, Robert Street, Toronto, Canada.
 - *Sro. Bedrih Pollak, Vys Myto, Bohemia, Austria.
 - *Sro. Jiudrich Cadik, Vys Myto, Bohemia Austria.
 - *Fino. H. Bay, 6 bis, Rue de Reverdy, Chartres, Eure et Loir, France.
 - Sro. Isao C. Saito, 120 Nishitobe, Yokohama, Japan.
 - *Sro. Stanley E. Alec, 98 Elm street, Burnley, Lanes, England.
 - *Sro. J. Alexander, 57 Gray street, Burnley, England.


Sro. Arnold Carlson, St. Petersburgo, Stoljarnyj, Pervelos, No. 4 Q 15, Russia.

EN USONO

- *Sro. G. D. Thornton, 510 East Avenue, Erie, Pa.
- *Sro. Joseph J. Burita, 114 Crighton Ave., Elgin, Ill.
- John Springer, Box 545, Red Cloud, Neb., U. S.
- Edwin R Fleming, 502 Ann St., Columbia, Mo.
- R. W. Tillotson, 221 East Fifth Street, Erie, Pa.
- Fino. Mary Louise Hall, Box 247, Waynesville, North Carolina.
- *Sro. Curtis B. Lore, 111 W. Market street, Danville, Penna.
- Sro. Lewis M. Cleaver, Orlando, Florida.
- Sro. F. H. Loud, 1203 N. Tejon street, Colorado Springs, Colorado.
- Fino. Irene Hilleary Beebe, R. 2, Burlington, Iowa.
- Verne Rice, Pension Office, Topeka, Kansas.
- *Sro. Arthur Schwemmer, 1335 Green street, Reading, Pa.
- Sro. M. D. Moore, Box 1, Valparaiso, Indiana.
- F. E. Owen, Republic, Mo.
- Jos. Schmid Jr., 81 Winslow Ave., Buffalo, N. Y.

LA PROVO · ESTAS LA PRUVO

Se vi metas anoncon en ia gazeto, kaj ricevas kontentigan nombron da respondoj, proporcie al la prezo de la anonco, vi tiam posedas la solan pruvon ke la gazeto taugas por anoncilo. Sed antaŭ la ricevo de tiu pruvo aliaj montriloj sin prezentas. Se la gazeto mem konstante kreskadas, tio estas signo de VIVO. Je gazeto la viveco estas tute tiel grava, kiel je arbo. Mortanta arbo ne portas multege da fruktoj. La abonantaro de Amerika Esperantisto kreskaads, kreskas ankaŭ la grandeco de la gazeto kaj la nombro de anoncoj. VIA ANONCO portos al vi taugan frukton, se vi plantos bonan en AMERIKA ESPERANTISTO

 Oni sendu mendon kun teksto antaŭ ol la 5^a de la antaŭa monato, por certigi enpresoh.

FOREIGN MAGAZINES.

We receive subscriptions for any Esperanto magazine published. Except upon special request, we do not forward addresses to the foreign publisher, but mail all magazines from this office. This insures the subscriber against loss of copies in long-distance transit, and against cessation of publication. When any publication which you are receiving through us suspends business, you may receive your money back or another periodical of equal value. For this additional security, saving of time, foreign exchange of money, etc., we add an average of 15 per cent to the yearly price of each publication.

We furnish no free samples. Single copies may be ordered at the prices quoted, and when possible the current numbers will be sent. In ordering, always mention a substitute. On orders for single copies amounting to more than \$1.00, a discount of 10 per cent may be taken. Subscribers are requested to note that many foreign publications combine two issues without notice; for example, January-February under one cover. Also that they sometimes appear as much as three or four months late. Do not complain of non-receipt until notice of the issue in question has appeared in **Amerika Esperantisto**. The names of publications wholly in Esperanto are printed in **heavy type**:

\$1.80 per year.	Per copy, 20c.
Lingvo Internacia.	
Tra la Mondo (Illustrated).	
\$1.60 per year.	Per copy, 15c.
Internacia Scienca Revuo.	
\$1.40 per year.	Per copy, 15c.
Brazila Revuo.	
Internacia Socia Revuo (Socialist).	
\$1.25 per year.	Per copy, 10c.
Germana Esperanto-Gazeto (semi-monthly).	
\$1.15 per year.	Per copy, 15c.
Pola Esperantisto.	
Katolika Espero (10 issues per year).	
Espero Pacifista.	
Filipina Esperantisto.	
Lumo (Bulgarian-Esperanto).	
Verda Stelo (Mexican organ).	
85c per year.	Per copy, 10c.
The British Esperantist.	
Casopis Ceskych Esperantistu (Bohemian-Esperanto).	
Esperantisten (Swedish-Esperanto).	
Germana Esperantisto.	
Amsterdama Pioniro (Dutch-Esperanto).	
75c per year.	Per copy, 10c.
Finna Esperantisto.	
Rumena Esperantisto.	
65c per year.	Per copy, 10c.
Svisa Espero.	
Dana Esperantisto.	
Juna Esperantisto.	

FOR THE FIFTH CONGRESS.

Every person who is interested in Esperanto from any standpoint is requested, in order to help secure the Fifth World Congress of Esperantists in America, either to fill out the following blank for as many tickets as he may be able to purchase, or to write a statement in substantially the same form and send it to the Secretary of The American Esperanto Association, Fenway Station, Boston:

I agree to purchase tickets at Five Dollars each for the Fifth International Congress of Esperantists, if it is held at Chautauqua, New York, in the summer of 1909.

ESPERANTO BOOKS

These books are in stock and sent postpaid at prices named, by **Amerika Esperantisto**:

- GREEK TEXT BOOK, 45c.
- RUSSIAN TEXT BOOK, 30c.
- POLISH TEXT BOOK, 30c; WORD BOOK, 25c.
- ITALIAN-ESPERANTO DICTIONARY, 60c.
- PROVO DE MARISTA TERMINARO (Illustrated treatise on nautical terminology), 65c.
- THE THIRD ESPERANTO CONGRESS; an illustrated booklet of 44 pages; 20c.
- ORDO DE DISERVO; the church service used at Cambridge; 20c.
- BARDELL KONTRAU PICKWICK; a comedy from Pickwick Papers; 20c.
- BOX AND COX; a comedy; 20c.
- JULIO CEZARO; from Shakespeare; cloth, 65c.
- LA VENTEGO; Shakespeare's "Tempest;" cloth, 75c.
- SI KLINIGAS POR VENKI; Goldsmith's "She Stoops to Conquer;" a fine old comedy; cloth, 50c.
- LA PREDIKANTO; translation by Dr. Zamenhof of the Book of Ecclesiastes; a classic, 25c.

Tell your NEWSDEALER that he can secure AMERIKA ESPERANTISTO from the wholesaler and SEE THAT HE DOES IT. Unsold copies returnable.